

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

---

## IPR

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj  
ILEI

---

**Jarkolekto 14**

**N-ro 2, 1984**



## Internacia Pedagogia Revuo – n-ro 2, 1984

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090

Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

## Enhavo

1. Survoje al Internacia Lerneja Semajno aŭtune 1986
2. Esperanto Projekto Nederlando
3. Protokolo de la Printempa Estrarkunsido de I.L.E.I. Ŝkofja Loka (Jugoslavio) 16/18 aprilo 1984 – Kelkaj interesajoj
4. Amendoj kaj modifoj de la Internacia Pedagogia Ekzameno de I.L.E.I.
5. Studobjektoj
6. Pri la Jubilea Jaro Lis Thune, sekciestro de I.L.E.I en Danujo
7. Karaj geamikoj Renato Corsetti, estrarano pri planado de uea
8. Dum Fakkunveno de la instruistoj Bulgara Esperanto Asocio

## Survoje al Internacia Lerneja Semajno aŭtune 1986

Por glate kaj sukcese funkciigi la Internacian Lernejan Semajnon aŭtune 1986 kvar ne-rezigneblaj kondiĉoj jam antaŭe – antaŭ ol komenciĝos la ILS – estu sen ia dubo certigitaj:

1. La bezonata nombro da geinstruistoj kaj helpantoj ekvilibre reprezentu la nunan mondon.
2. Okdek aŭ naŭdek gelernantoj inter 9/10ĝis 15/16 jaraĝaj partoprenontaj pere de siaj instruistoj.
3. Pretaj gastigi la ILS-on estas Hungario kaj Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.
4. Solida financa bazo.

### La nuna stato

1. Anoncis sin 26 gekolegoj el 10 eŭropaj landoj kaj tri el Afriko kaj Azio.
2. Junaj Esperantistoj estas ĝis nun tri el Germanio, unu el Britujo kaj du el Koreujo, do ses ĉefaj partoprenontoj, (en dua dissendita bulteno mi petis la gekolegojn informi min pri la nombro de la probable partoprenontaj infanoj kaj junaj gelernantoj).
3. Pretaj gastigi la ILS-on estas Hungario kaj Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.
4. ILEI disponas pri neniuj financaj rimedoj por financi nian projekton. Tamen, gekolegoj instrue preparas nun infanojn por la ILS. Senpage! Tiu ĉi laboro egalvaloras almenaŭ al 150 000 gm, ne enkalkulitaj la kostoj por la instrumaterialo memfarata de la gekolegoj. Krome oni konsideru la nepagotan kunlaboron dum la ILS: ni bezonos 30 gekolegojn kaj helpantojn!

Sed ILEI devas i.a. zorgi pri restado de la Internacia Kolegio kaj gelernantaro, por gravaj atestantoj kaj observantoj kaj helpi subvencii gekolegojn kaj gelernantojn el foraj landoj.

La estraro decidis aranĝi ILS-fonduson. Petataj donaci monon estas samideanoj, simpatiantoj, helppretaj organizaĵoj, registaroj (el financaj rimedoj por internaciaj junularaj renkontoj), uzinoj, gazetaraj entreprenoj, instruistaj sindikatoj ktp.

La konstanta konto de la ILS-fonduso estas/

ILS-fonduso

poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stokholmo)

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI.

Södra Rörum pl. 455

S-242 000 Hrby

Ĉiu donacinto ricevos kvitancon.

La estraro de ILEI konsciiĝas, ke la ILS nur estos realigebla, se la kvar esencaj kondiĉoj plenumiĝos. La prezidanto de ILEI subskribos nur tiajn kontraktojn, kiuj ne malutilos nian ligan. Pri la kunhelpo de la sekcioj ni jam skribis en IPR 3/83.

Sole la nederlanda sekcio, agante pere de kolego Une Hoekstra aktive kaj ideoj-riĉe eklaboris. IPR publikigos modelan alvokon al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj en Nederlando. Tre detale okupiĝos ankaŭ la komitato en Ŝkofja Loka kun la temo.

hso

## Esperanto-Projekto Nederlando

Konsiderante ke en iu momento la Internacia Lerneja Semajno estos organizata, nun stariĝas la demando: "Kiu aktivecoj estus jam antaŭe startitaj?"

Pripensata estas la komenciĝo de Esperanto Projekto en kiu partoprenos minimume du bazaj lernejoj, eble plivastigota per du lernejoj por daŭriga instruado.<sup>1</sup>

Elirante de tiuj bazaj lernejoj, nun temas pri du kvaraj aŭ kvinaj klasoj aŭ grupoj el tiaj klasoj, ambaŭ kun unu docento.<sup>2</sup> Dum la lernojarokazo instruado dum 40 lecionoj/horoj. Kvankam ekzistas iom da instrumaterialo, ŝajnas tre utile verki instrupakedon por Esperanto per kaj dum la projekto. Se, iel ajn, la Internacia Lerneja Semajno ne okazos, la laboro tamen havos rezulton.

Tia projekto postulas du ĝis tri jarojn da preparado. Le lecionoj ĉiukaze povos esti donataj ekster la hortabelo de la lernejo; se la inspektoro permesas, estas eblecoj dum al instrutempo.<sup>3</sup>

La Centro por Internacia Edukado en la Nederlanda Instruado (CEVNO) povas realigi ĉi tian limigitan projekton, kondiĉe ke la financoj estos troveblaj.

### Buĝeto

Gld.	6 000,-	projekto-kunlaboranto CEVNO ½ tago semajne
	3 000,-	rekompenco por la instruistoj
	3 000,-	instrumaterialo
	3 000,-	vojaĝ- kaj restadkosto
	2 000,-	administrado
	2 000,-	neantaŭvidita
Gld.	19 000,-	



Rimarkoj de la tradukinto:

1. Per "daŭriga instruado" estas celata ĉiuj formoj de la instruado post la elementa lernejo.
2. Kvankam oni parolas pri baza lernejo ĉi tie estas celata elementa lernejo kiu enhavas entute ses lernojarojn inter la sesa kaj dekdua jaraĝo.
3. Ankaŭ estas eblecoj en la kadro de la "liberaj aktivecoj" kvankam la ministro celas tiujn por la instruado de la angla lingvo li ne ekskluzivas aliajn temojn.

# Protokolo

de la

## Printempa Estrarkunsido de I.L.E.I. Skofja Loka (Jugoslavio) 16/18 aprilo 1984 ĉe Hotelo Transturist

Laŭ la invito sendita la 01/02/1984 fare de la prezidanto de ILEI, la estraranoj de ILEI kunvenis en Skofja Loka por partopreni la estrarkunsidon.

Dimanĉe vespere 15/04/84 kunvenis ĉe hotelo Transturist:

1. Rektoro H. Sonnabend – prezidanto de ILEI
  2. S-ino A. Huršak – vicprezidantino de ILEI
  3. D-ro M. Dazzini – ĝenerala sekretario
  4. S-ro B. Andreasson – ŝarĝito pri financaj problemoj kaj kiel gastoj:
    1. D-ro P. Zlatnar – prezidanto de K.O.K.
    2. D-rino K.G. Dazzini – sekciestrino de ILEI por Italio
    3. S-ino K. Ruff-Sonnabend – sekciestrino de ILEI por F.R. Germanio.
    4. S-ino Andreasson vicsekciestrino de ILEI por Svedio.
- Laŭ la suba skiza programo, pri la jenaj temoj:
1. La 18a Konferenco: programigo kaj temigo, skemo de la konferenco.
  2. Diskutado kaj konsiliĝado pri la efikeco de niaj konferencoj: Krom pri kialo, celo metodo, enhavo, aparta konsiderado pri la loko, regiono, lando de niaj konferencoj: vidpunkto laŭ neceso kaj graveco
  3. Stato de la preparo de la ILS-1986: nombro kaj nomo de la gekolegoj pretaj partopreni; la ebla loko; la pli sekvantaj paŝoj, ekz. lerneja fonduso...
  4. 1987: la vera stato de la internacia komitato pri preparo de la jubilea jaro. Dissplitiĝo aŭ demonstrado pri la Zamenhofa esenco de la esperantismo (Bulonja deklaro 1905) – Informoj, konkludoj kaj decidoj. Eblecoj.



- a. kongreso de Esperanto.
  - b. Kongreso de UEA kaj adaptiĝo de la ceteraj organizaĵoj.
  - c. Paralela kongreso de la "ceteraj organizaĵoj"
  - ĉ. Konferencoj, kongresoj laŭ ĉies gusto aŭ kredo.
5. La stato de la kunlaboro inter ILEI kaj UEA laŭ la interkonsento: raporto, diskuto, nia starpunkto.
  6. Perspektiva programo de ILEI ĝis 1990: Informado – Centroj por klerigado de Esperanto – Instruistoj – Esperanto aŭ ILO – Modernigo de la fundamento de Esperanto laŭ varbadaj kaj informadaj vidpunktoj – Kreado de esperantlingva infanliteraturo – Ŝanĝo de nia stato ĉe Unesko.
  7. Diversaĵoj: vizito de gazetejo, kontaktoj kun instruistoj kaj instruistaj instancoj.

### Kelkaj interesajoj el la estrarkunsido

Bertil Andreasson raportis pri la ebleco organizi dum 1985 la 19an Internacian ILEI Konferencon en Svedio de la 23a ĝis la 30a de julio. Li kontaktis la Nordan Popolaltnernejon en la urbeto Kungälv, 30 km. norde de Gotenburgo, facile atingebla aviadile, trajne, kaj ŝipe. La lernejo estas bele situanta sur monteto apud la urbo. La vidindaĵoj estas belaj: oni vidas la ruinojn de la malnova fortikaĵo Bohus kaj la riveron Göta älv. La rektoro de la lernejo estis ege afabla kaj volonte gastigus nian konferencon, se ILEI decidus tion. La prezo estas modesta, se oni konsideras ke Svedio estas multekosta lando. La manĝaĵo (matenamnĝo, lunĉo, vespermanĝo), loĝado kaj la uzo de la diversaj ejoj kostos proksimume 250 sv. Kronoj persone kaj tagnokte. Oni loĝos en pluraj domoj kun unulitaj kaj dultitaj ĉambroj, modernaj.

Je la 11 horo la estraro aŭtomobile atingis en Ljubljana la ejon kie, je tagmeze okazis la akcepto, vere tre afabla, ĉe la Ministerio pri Edukado, fako Instruado de Fremdaj Lingvoj en la elementaj lernejoj. La inspektoro S-ro Peter Vinkler prezentis la kadron de la nuntempa instruado de fremdaj lingvoj en Slovenio ekde la elementaj ĝis la superaj lernejoj, kaj sekve Direktorino Nevenka Selithar detale donis informojn pri la fakultativa instruado de fremdaj lingvoj en la elementaj lernejoj.

Je la fino de la renkontiĝo la estraranoj ricevis kopion de la presitaj oficialaj programoj por la libervola instruado de fremdaj lingvoj inter kiuj Esperanto, kiu estas libervole instruebla en la elementaj lernejoj de Slovenio. Krome D-rino Selithar montris la jam pretan malneton de la detala ampleksa programo por libervola instruado de Esperanto ankaŭ en la mezgradaj lernejoj de Slovenio.

La estraro de ILEI pritraktis, diskutante, la staton de la internacia lerneja semajno en la jaro 1986 kaj faris jenan konkludon: ekzameni denove la eblecojn kolekti gelernantojn devenantaj el diversaj rasoj kaj landoj. loĝantaj en Eŭropo kaj decidis krei fonduson por financi la internacian lernejon.

La Prezidanto informis la estraron pri la nuna stato de la Internacia Komitato pri preparo de la Jubilea Jaro. Ĝi notis la malkontenton de la prezidanto, kiu plendis pro la ne glata laboro de la internacia komitato kaj la ILEI prezidanto havis la impreson ke UEA ne havas grandan intereson vere kunlabori en la Komitato. Li bedaŭras ke kvin kontraŭ kvar entute rifuzis diskuti komunan agadprogramon kaj proceduran regularon. Li opinias ke UEA havas la intencon pli kaj pli adapti la ceterajn organizaĵojn nur al la agadprogramo de UEA. La estraro interkonsentas kun la prezidanto ke li faru lastan provon por tamen atingi komunan kongreson de Esperanto aŭ alternative proponi ke Internaciaj Organizaĵoj ne partoprenontaj la UEA-Kongreson dum 1987, aparte interkonsenti pri dua kongresa manifestacio. Se li ne sukcesos atingi unuecan agadon, ILEI festos la centjaran datrevenon en Boulogne sur Mer.

Rilate la Esperanto-Institutojn, la Akademio de Esperanto fondis komisionon sub la nomo "Akademio de landaj Esperanto-Institutoj". ILEI fariĝis membro de tiu ĉi komisiono; por la laboro respondecas D-ro Bormann, ĝenerala sekretario de la Akademio. Ni celas atingi agnoskon de nia internacia pedagoga ekzameno de ILEI kaj ankaŭ ke la Akademio donu por niaj diplomoj la validigan subskribon.

La prezidanto tuŝis en la diskutado ankaŭ la faldprospekton, kiu havas la celon varbi novajn membrojn. Li substrekis la neceson traduki ilin en naciajn lingvojn por varbi kolegojn, kiuj ankoraŭ ne estas esperantistoj kaj membroj de ILEI. En la sekvo li petis la estraranojn konsideri la eldonon de konciza priskribo de Esperanto sur la bazo de la Zamenhofa Fundamento. La estraro atendas de la prezidanto tiu-



rilatan ellaboraĵon de la informilo por en alia estrarkunsido prijuĝi la valoron de la antaŭcitita laboraĵo.

Nombro de membroj de ILEI 1983:

Aŭstralio 7; Aŭstrujo 20; Belgio 25; Brazilo 10; Britujo 50; Bulgarujo 10; Danlando 12; Finnlando 30; Francujo 35; Germanujo 61; Hispanujo 30; Hungarujo 1; Israelo 6; Italujo 135; Jugoslavujo 15; Koreujo 20; Luksemburgo 1; Nederlando 46; Norvegujo 15; Pollando 1; Portugalujo 7; San Marino 5; Svedujo 48; Svislando 1; Usono 58; Totalo: 649.

La prezidanto informis pri la alveno de invito fare de Unesko partopreni konkurson pri homaj rajtoj: la konkursaj kondiĉoj postulas ke la kandidatoj esence kontribuis al la disvastigado de ideo pri la homaj rajtoj. La premiito ricevos 4 000 dolarojn. La estraro decidis ke ILEI kandidatiĝu venontjare.

## Ekonomia Raporto de ILEI 1983

### Saldo 1983 01 01

En banko: SE-banken	52 547,65	
Handelsbanken	4 647,40	
En poŝtĝiro	4 097,34	61 292,39

### Enspezoj:

Membrokotizoj: por 1982	2 216,25	
por 1983	19 531,73	
por 1984	86,04	21 834,02
Gajno en Sintra	4 089,39	
Donaco	239,01	
Rento	6 613,63	
De konto ilek-a (UEA)	4 436,82	37 212,87

### Elspezoj:

IPR	8 565,43	
Estrarkunsido	2 526,57	
Poŝto, telefono	3 579,46	
Bankkostoj	164,53	
Libroj, presaĵo, papero ktp.	5 361,12	- 20 197,11

Gajno 1983: 17 015,76 17 015,76

### Saldo 1983-12-31:

En kaso	159,50	
En banko: SE-banken	71 133,65	
Handelsbanken	5 063,05	
En poŝtĝiro	1 951,95	78 308,15

### En Svislando (laŭ raporto de s-ro Kurt Greutert):

Banklibreto	kapitalo	rento	kapitalo
	83-01-01	1983	83-12-31
sfr.	1 162,20	44,30	1 206,50
sfr.	1 273,50	48,55	1 322,05
sfr.	193,95	7,40	201,35

### Entute sfr.

En svedaj kronoj	2 629,65	100,25	2 729,90
laŭ kurzo 83-12-30	9 658,70	368,22	10 026,92 10 026,92



En Nederlando:

Konto ilek-a

ĉe UEA ned.gld: 1 041,60

En svedaj kronoj

laŭ kurzo 83-12-30 2 271,18 2 271,18

Entute favore al ILEI

1983-12-31

sv.kro. 90 606,25

La prezidanto gratulas S-ron Bertil Andreasson kaj la estraro unu-  
nime aprobas la ekonomian raporton.

## Amendoj kaj modifoj de la Internacia Pedagogia Ekzameno de ILEI

La ĝisnuna proceduro de nia regularo montriĝis jam de komence  
tro rigida kaj malmulte fleksebla; sed male nia sistemo en nur malpli  
da jaroj malhelpis pliiigi ekzamenitajn instruistojn.

Modifendaj estas jenaj punktoj:

- La diplomon subskribas la prezidanto kaj du membroj de LEK kaj  
validigas ĝin per subskribo kaj stampo la prezidanto de EKI. (Art.  
7.1; LEK = Loka Ekzamena Komisiono; EKI = Ekzamena Komit-  
tato de ILEI)

La diplomo kun la titolo: internacia-diplomita Esperanto-peda-  
gogo havos por la diplomito nur tiam konkretan valoron, kiam ĝi  
estos prezentebla al ŝtataj lernejoj instancoj. Tial havas la subskribo  
kaj stampo de prezidanto de EKI ne la sufiĉan aŭtoritaton. Ĉar la  
akcento de la titolo substrekas la vorton "internacia" iu nacia univer-  
sitato ne povas doni la optimuman prestiĝon al la diplomo. *Jen devus  
agi la Akademio de Esperanto el kiu membro, komisiita de la akade-  
mio, subskribos en ties nomo kiel aŭtoritata instanco.* PS. Ne temas,  
ke la akademio organizu la ekzamenon, ĝi nur donu la kvazaŭan ofi-  
cialigon.

- Ĉiuj paragrafoj de la ekzamena regularo restas validaj, ili ricevos  
sekvantajn modifojn krom la jam nomitan:

Ĉiu pli granda sekcio (almenaŭ 30 membroj) havas la rajton post  
aprobo per la estraro de ILEI fondi sekcian ekzamenkomisionon po  
almenaŭ tri membroj, ĉiu el ili havu anstataŭanton. Ĉiu membro de  
la sekcia komisiono posedu minimume la ateston pri la plej alta grado  
de la lingva kono akirita de renomita Esperanto-Instituto. Same ili  
disponu pri profunda sperteco en la instruado de Esperanto aŭ en  
aliaj fremdaj lingvoj. PS: Membroj de la komisiono estu la unua  
generacio de ekzamenantoj, ili devigu sin same submeti sin al la

Internacia Pedagogia Ekzameno, sed se estas grandaj meritoj en la lingva laboro ili povos ankaŭ ricevi la titolon de Dipl. IPE pro honoraj kaŭzoj.

- Pri la organizado de ekzameno (Art. 3) respondecas la estraro de ILEI. Por la disertacio validos nova proceduro.
- Pri Art. 4, 5, 6 kaj 7 (krom prezidanto de EKI) respondecas la sekciaj komisionoj.
- La sama proceduro validas en internaciaj porinstruistaj seminarioj.
- La ekzamena parto de la regularo estu jene modifita:
  1. Kandidato, posedante ateston pri pli alta lingva kono de nacia Esperanto-Instituto, kies lingvaj postuloj estas konformaj al la lingvaj postuloj de IPE, povas esti liberigita parte aŭ tute de la skribaj kaj buŝaj partoj, escepte de Art. 5.3.3 kaj 5.4.4.
  2. kandidato, posedante krom la ateston de Esperanto-Instituto, ankaŭ la instrurajton pri iu fremda lingvo povas esti liberigita ankaŭ de Art. 5.3.3 kaj 5.4.4.
  3. Pri aliaj variantoj kaj modifoj de IPE de ILEI estos diskutata dum Komitatkunsido en Ŝkofja Loka.

hso

## Studobjektoj de JPE

- 1.0 **Sistema gramatiko de Esperanto**
- 1.1 La bazaj karakteriziloj de Esperanto. La 16 reguloj.
- 1.2 **Fonetiko:** La fonetika segmentado de la parolfluo. La Esperanto vokalismo: klasifiko kaj formado de vokaloj. La konsonantoj de Esperanto: klasifiko kaj formado de konsonantoj.
- 1.3 **Fonemiko:** La fonemsistemo de Esperanto. La diftongoj en Esperanto. La silabo. La akcento. La karakteriziloj de Esperanto-vortakcento. La influo de elizio.
- 1.4 **La grafiko de Esperanto:** grafemoj, literoj, supersignoj, interpunkcio. Fonemikeco kaj fonetikeco de Esperanto-grafiko. Ortografio: la uzo de interpunkciaj signoj. Majusklo-minusklo. Transliterigo kaj transskribo.
- 1.5 **Leksiko:** La inventaro de Esperanto-vortelementoj. Ilia valoro. La interkombino de vortelementoj: la libereco de la kombino kaj ĝiaj limoj. La principo de neceso kaj sufiĉo (de Saussure). Vortigaj operacioj: finaĵŝanĝo, derivado, kunmeto.
- 1.6 **Morfologio - formologio:** La parolpartoj, vortspecoj. La substantivo: komunaj-propraj; nombro; genro; deklinacio. La adjektivo: ĝia formado kaj ĝiaj specoj. Deklinacio kaj komparado. La artikolo. La pronomoj: klasifiko laŭforme kaj laŭfunkcie. Originalaj derivitaj kaj tabel-pronomoj. Persona, senpersona, refleksiva pronomoj. La poseda pronomo. Demandaj, rilataj kaj montraj pronomoj. Generaligaj, neaj pronomoj. La emfaza kaj reciproka pronomoj. La numeralo: baza, orda, multiplika, fraciiga, kolektiviga kaj



divida numeraloj. Matematikaj operacioj kaj numeralaj sintagmoj.

La adverbo: klasifiko laŭforme kaj laŭfunkcie. Originalaj, aŭ-adverboj, tabeladverboj, e-adverboj. La grandigo de adverboj.

La verbo: voĉoj, modaloj, modoj. Simplaj kaj kompleksaj verboformoj. Verbonomoj: infinitivo, participoj. Aktivaj kaj pasivaj strukturoj.

La prepozicioj: simplaj kaj kunmetitaj. —

La partikuloj: subjunkcioj, konjunkcioj.

La interjekcioj kaj onomatopeoj.

1.7 **Sintagmatiko:** La tipoj de vortrilatoj en Esperanto. La sistemo de sintagmoj.

1.8 **Sintakso:** La fraztipoj laŭ konstruo kaj paroltono. Elipsaj frazoj. Frazelementoj. La subjekto. La predikato: simpla kaj kompleksa. La kopulo kaj la predikativo. La objekto: rekta kaj nereakta; infinitiva objekto. La adjekto: ĝia modelo kaj specoj. Epiteto. La kompleksa frazo. La suborditaj prepozicioj kaj iliaj specoj. La vortordo.

## 2.0 Esperanto literaturo

2.1 **Enkonduko:** La karaktero de Esperanto-literaturo. Originala kaj tradukita verkaro. Lingvistikaj kaj poetikaj konceptoj. La influo de la literaturo al lingvoevoluo. La teritoria kaj tempa divido de la literaturaj periodoj. La karakteristikaj stiltendencoj de opaj periodoj.

2.2 **La unua periodo:** Literatura agado de Zamenhof. Originalaj verkoj: poemoj; proverbaro; kongresaj paroladoj. La Fundamenta Krestomatio. Grabowski, Belmont, Devjatnin, Kofman, Dambrauskas, Kabe. La slava skolo: primitiva romantikismo. La "lingvistika" tendenco de franca skolo: Vallienne, Bourlet, Cart, Boirac, R. de Saussure. La unuaj poetoj: Privat, Hankel, Schulhof, Kozłowski, Kriss. La apreco de la unua periodo, precipe la literaturaj konceptoj de Grabowski kaj Kabe.

2.3 **La dua periodo:** La "Budapeŝta skolo" kaj la rondo de "Literatura Mondo". Kalocsay kaj Baghy. La naskiĝo de moderna Esperanto-literaturo. "Dekdu poetoj" kaj "Naŭ poetoj".

Szilágyi, Bodó, Tárkony. La konservativa kaj progresiva tendencoj. La neologisma diskuto. La teorio de Esperanto literaturo: La "Parnasa Gvidlibro". La naciaj "skoloj": estonoj: Adamson kaj H. Dresen; britoj: Buttler, Newell, Sturmer, Luyken; katalunoj: J. Grau Casas, A.D. i Mas. La soveta skolo: (socialisma realismo kaj partieco) Varankin, Mihalski, Hohlov, Erosenko. La proletaj verkistoj: Lanti kaj Emba. La nordanoj: Bulthuis, Nylén, M. Carlsson, S. Engholm (realisma romano). La satira kaj fantastika prozo: R. Schwarz kaj Jean Forge. La antologioj: kataluna (1925), bulgara (1925), belga (1928), estona (1932), hungara (1933), ĉeĥoslovaka (1933), sveda (1934). La plej signifaj tradukaĵoj de la periodo. La hungaraj klasikaj kaj siatempaj verkoj esperantlingve.

2.4 **La tria periodo:** La influo de la dua mondmilito: pacifismo kaj universalismo. La skota skolo: W. Auld, R. Rossetti, J.S. Dinwoodie, J.I. Francis ("Kvaropo"). "Metafizika" tendenco. La diasporo de moderna literaturo: Boulton, Szathmári, Rosbach, Mattos, Ragnarsson, Urbanov, E. de Kock, Nišimura Masao; formorompo, liberaj versoj. La popularscienca literaturo: T. Sekelj, P. Neergaard. La es-literaturo: Waringhien, Regulo-Perez, Brandon Clark. Oratorarto: Lapenna. La plej gravaj tradukaĵoj el la monda literaturo. La beletraj ĵurnaloj kaj revuoj.

## 2.5 Proponitaj legaĵoj

### 2.5.1 Unua periodo:

*Zamenhof L.L.:* Originalaj Poemoj, Esperanto Proverbaro, Kongresaj Paroladoj, Fundamenta Krestomatio.  
*Grabowski:* Tagiĝo, Reveno de l' filo, Sur unu kordo.  
*Privat:* Tra l' silento, Ginevra, Historio de Esperanto.  
*Vallienne:* Kastelo de Prelongo.

### 2.5.2 Dua periodo:

*Kalocsay, K.:* Mondo kaj Koro, Streĉita Kordo, Rimportretoj.  
*Baghy, J.:* Viktimoj, Sur Sanga Tero, Songô sub Pomarbo.  
*Baghy/Kalocsay:* Arĝenta Duopo, Ora Duopo.  
*Tárkony, L.:* De Paĝo al Paĝo, Soifo.  
*Kalocsay/Waringhien:* Parnasa Gvidlibro.  
*Szilágyi, F.:* Mistero Minora.



*Adamson, H.*: Vesperkanto.  
*Schwarz, R.*: Kiel Akvo de l'Rivero.  
*Kuyken, H.A.*: Pro Iŝtar.  
*Mihalski, E.*: Fajro Kuracas.  
*Hohlov, N.*: La Tajdo.  
*Engholm, S.*: Homoj sur la Tero.  
*Baranyai, E.*: Ekzilo kaj Azilo.

### 2.5.3 **Tria periodo:**

*Auld, W.*: Infana Raso.  
*Kvaropo/Stafeto*, 1952.  
*Rossetti, R.*: Pinta Kraĵono.  
*Boulton, M.*: Eroj, Virino ĉe Landlimo.  
*Szathmári, S.*: Vojaĝo al Kazohinio, Maŝinmondo.  
*Waringhien, G.*: Lingvo kaj Vivo, Eseoj.  
*Sekelj, T.*: Tempesto super Akonagua.  
*Mattos, G.*: Ivan VI.  
*Urbanova, E.*: Nur Tri Kolorojn.  
*De Kock, E.*: Ombroj de la kvara Dimensio.  
*Nišimura, M.*: Edelvejso.  
*Ragnarsson, B.*: Ŝtupoj sen Nomo.

### 2.5.4 **Tradukajoj**

*Shakespeare/Zamenhof*: Hamleto.  
*Mickiewicz/Grabowski*: Sinjoro Tadeo.  
*Prus/Kabe*: La Faraono.  
*Kalocsay*: Ezopa saĝo.  
*Shakespeare/Rossetti*: Otelo.  
*Degenkamp*: Taglibro de Anne Frank.  
*Ibsen/Haugen*: Peer Gynt.  
*Jeluŝić/Rotkvić*: Cezaro.  
*Puŝkin/Nekrasov*: Eúgeno Onegin.  
*Benavente/Inglada*: Hispanaj Dramoj.  
*Tagore/Lakshmiswar*: Malsata Ŝtono.  
*J.E. Leppäkoski*: Kalevala.

### 3.0 **La Historio de Movado**

3.1 **Interlingvistiko:** Enkonduko: La problemo de multlingveco kaj ĝia klarigo en la antikvaj mitologioj. La teorioj pri la origino de la lingvoj. La klasigo de lingvoj. La lingva kaoso kiel

internaci-socia problemo. La unuaj perantaj lingvoj: la interlingvoj de la antikva diplomatio kaj komerco. La latino kiel la interlingvo de la mezepoko. La koloniismo kaj la kreolaj lingvoj. Lingvomiksiĝo kaj miksitaj lingvoj. La sciencistoj de la XVII-XVIII-aj jarcentoj. Pri la ebleco de artefarita lingvo kaj iliaj lingvoplanoj: Descartes, Komensky, Leibniz, Newton. La problemo de interkomunika lingvo de la antikveco ĝis niaj tagoj.

3.2 **La precibernetikaj lingvaj modeloj:** La lingvaj kaj ne-lingvaj signo-sistemoj. La elformiĝo de skribsistemoj. La pazigratioj. La tipologio de artefaritaj lingvoj; aprioraj kaj aposterioraj lingvo-planoj. La unua internacia lingvo: la Volapüko. La Volapüka Akademio kaj la reformoj. La postvolapükaj lingvoj: Idiom Neŭtral. Pruvoj revivigi mortintajn lingvojn. Minimum-/basic-/ lingvoj kaj kompromisaj lingvoj. La zonala teorio kaj la zono-lingvoj: interromana, intergermana, interslava, interskandinava lingvoj. Peano: Latino sine flexione; Jespersen: Novial; von Wahl: Occidental; Goode: Interlingva.

3.3 **Historio de Esperanto:** Zamenhof kaj la lingvoplando: Lingvo Internacia. La unua lernolibro. La ekfunkcio de la lingvo kaj ĝia disvastiĝo: presaĵoj, literaturo. La unuaj organizaĵoj. Lingvaj diskutoj: reformprojektoj, la delegitaro, IDO (Couturat, de Beaufront). Esperanto dum la Unua Mondmilito kaj post ĝi. Sciencaj, kulturaj, fakaj internaciaj Esperanto-organizaĵoj.

La Akademio. La Universalaj Kongresoj kaj Internaciaj Someraj Universitatoj. Esperanto en la Societo de Nacioj kaj UNESKO.

Esperanto post la Dua Mondmilito. La nuna stato de la Movado. La laborista movado kaj SAT.

4.0 **Metodiko:** La historio de lerneja instruado de Esperanto. La loko de Esperanto en la sistemo de lernejoj studobjektoj; ĝiaj pedagogiaj kaj didaktikaj valoroj. Edukaj celadoj efektivigebaj dum ĝia instruado. Ĝia transfera rolo en la sistemo de fremdlingva instruado.

La faktoroj, determinantaj la instrumentodon de Esperanto. La planado de la instrumaterialo: metodologia tipologio, al



“minimumoj”, produktiva, reproduktiva kaj receptiva materialo. Metodologio de lernolibro.

La leksiko de Esperanto kaj la metodo de ĝia instruado. La Esperanto-gramatiko kaj ĝia instruado. Fonetiko, ortografio kaj intonacio. La elformado de skribkapablo. Legotekniko: analitika kaj sintetika legadoj; la legado, kiel informacia fonto. La evoluigo de parolkapablo: la frazocentra kaj vivproksimeca principoj de la instruado.

La ĝisnunaj instrumetodaj konceptoj. La Ĉesh-metodo. La moderna kompleksa-aktiva/KA-metodo. La eblecoj de programigo en la instruado de Esperanto, la instrumaŝinoj.

La planado kaj la antaŭpreparo de instru-eduka laboro. La demonstrado: teknikaj instruhelpiloj kaj tradiciaj demonstriloj. La antaŭpreparo de la studhoru, ĝia organizado kaj gvidado. La studhor-tipoj. La prezentado kaj ekzercado de nova materialo. La parola kaj skriba kontrolo kaj pritakso. La krominstruhora laboro: rondetoj, korespondado, renkontiĝoj.

*Bonvolu kompari kun viaj naciaj postuloj!*

## Pri la Jubilea Jaro

### Lis Thune, sekciestrino de ILEI

Al la legantoj de IPR

En la printempo 1980 la prezidanto de ICNEM (Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado) Prof. D-ro Ivo Lapenna invitis al kunlaboro okaze de la centjara datreveno de Esperanto en 1987, opiniante, ke la Esperanto-Movado devus kunigi ĉiujn fortojn por sufiĉe digne celebri tiun eventon. La unuaj reagoj ŝajnis tre pozitivaj. La prezidanto de UEA, S-ro G. Maertens, jam en 1980 invitis Prof. Lapenna al interparolo, kio okazis en Brugge la 1-an de aprilo 1981. En tre agrabla kaj amikeca atmosfero la du prezidantoj interkonsentis pri invito al kunsido de laborkomitato, kiu devus prepari la vojon al internacia interorganiza kunlaboro. Inter la organizaĵoj, kiuj promesis kunlaboron, estas ILEI. Jam okazis pluraj kunvenoj, bone referitaj en „Horizonto”, la organo de ICNEM, sed tute ne menciitaj en „Esperanto”, la organo de UEA. La plej lasta okazis dum pentekosto 1983 en la svisa urbeto La Chaux-de-Fonds. Tiun kunvenon mi partoprenis kiel anstataŭanto de nia prezidanto de ILEI, Helmut Sonnabend, kiu ne povis ĉeesti pro samtempa jarkunveno en Germanio. Ĉar li tamen deziris, ke ILEI estu reprezentita li petis min, sekciestro de Danio, reprezenti ILEI-on.

Mi ne intencas tie ĉi detale raporti pri la sufiĉe streĉaj diskutoj dum tiu longa tago. Ĉar estas malfacile por mi samtempe noti kaj partopreni en diskutoj, mi surbendigis la tutan kunvenon por povi raporti kiel eble plej ekzakte. Mi sendis kopion al nia prezidanto de ILEI. Tion mi faris, kvankam la memelektita gvidanto de la kunveno, S-ro Maertens, dufoje protestis pro la surbendigo. Tiujn protestojn mi ne volis sekvi, ĉar laŭ mi liberaj diskutoj inter liberaj asocioj ne povas enhavi sekretojn. Ĉiuj, kiuj volas scii, kio vere okazis, povas ĉe mi



akiri kopiojn de la bendoj, same kiel oni almenaŭ tie ĉi en Danio povas akiri al si transskribaĵojn de ĉiuj diskutoj en la dana Parlamento.

Mi skribas tiun ĉi artikoleon, ĉar mi deziras indigne protesti kontraŭ la maloftaj kaj misgvidaj informoj en „Esperanto” pri la kunlaboro, informoj, kiuj klopodas ŝajnigi malverojn veraj kaj verŝajnigi malverojn, por krei tendencan opiniĝon kontraŭ lojala kunlaboro. Partoprenis en la kunveno nur 9 (naŭ) membroj kun voĉdonrajto, kaj laŭ UEA – kvankam ili mem prokrastadis la kunvokon al lasta minuto – tiuj 9 rajtis decidi por la tuta Esperanto-Movado. Kontraŭ tio 4 el la 9 protestis. Dum preskaŭ la tuta tago ni diskutis – ne bazon por la kunlaboro – sed Proceduran Regularon, kies ĉefa celo estas anticipi doni al la prezidanto de UEA la postenon de prezidanto de IKK (Internacia Kunordiga Komitato). Kvar el la naŭ kontraŭis, opinie, ke IKK mem elektu sian prezidanton.

Alia stranga diskutpunkto estis la bazo por la kunlaboro. Invitinte al la kunlaboro, ICNEM pere de sia prezidanto ellaboris projekton de Baza Programo, kiu dum ĝiaj konferencoj estis prilaborita kaj amendita. Dum antaŭaj preparaj kunvenoj aperis aliaj amendoj, kaj la Provizora Laborgrupo petis profesoron Lapenna prilabori tiujn amendojn en la Solidarigan Bazan Programon, kion li lojale faris. La intenco de tiu Baza Programo ne estas devigi kiun ajn al kio ajn, sed krei idearon, el kiu oni povas ĉerpi por sia propra agado, kaj kiun oni povas montri al eventualaj subtenantoj/subvenciantaj instancoj neesperantistaj. 5 el la 9 decidis, ke tute ne necesas komuna bazo por la kunlaboro: sufiĉas, ke UEA kolektu la programojn kaj kunordigu ilin. Se la tuta kunlabora programo devus enhavi nur tiun listigadon pere de UEA, mi ne komprenas la valoron de la jam okazintaj preparaj kunvenoj. En Danio ni nomas tian agadon trompo. En tiu kunteksto ankaŭ estas mirinde, ke UEA neniam al siaj membroj menciis la proponitan projekton de Komuna Baza Programo, sed nur dissendis sian propran kajereton.

Mi finas mian proteston per demando. Estas mia konvinko, ke tiu sinteno de UEA havas unu solan celon, nome nebligigi al Prof. Ivo Lapenna „ludi kiun ajn rolon” – kiel „Heroldo” malice skribis – okaze de la 100-jara datreveno. La tuta spektaklo en La Chaux-de-Fonds montris tion. Nun mia demando estas: ĉu vere la Esperanto-Movado posedas tiom da kleraj, eksterordinare inteligentaj, kaj ek-

stermovade estimataj homoj, ke ĝi tiel facilanime rajtus malebligi kaj rifuzi kunlaboron de la plej lerta, plej talenta kaj iniciatriciĉa esperantisto, kiu ekzistas depost Zamenhof? Ke la nunaj gvidantoj de UEA certe ne sukcesos en tiu malica plano ne estas merito de la nuna Esperanto-Movado, sed ŝuldiĝas nur al la ĝisosta fideleco al Esperanto, al Internacia Humaneco kaj al UEA de Prof. Ivo Lapenna. Mi profunde instigas ĉiun esperantiston, kiu legas tion ĉi, pripensi nian situacion. Ĉu vere vi volas, ke estontaj esperantistoj prijuĝu nin hodiaŭ same akre, kiel ni prijuĝas tiujn, kiuj perfidis Zamenhof, Privat kaj aliajn elstarajn esperantistojn? Ĉu ni ne tiun ĉi fojon savu nin mem de simila honto?

***Kion vi pensas pri Komuna Kongreso de Esperantistoj okaze de centjara datreveno de Esperanto?***

**UEA**

**Al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj**

Karaj geamikoj,

laŭ decido de la komitato de UEA dum la lasta kunsido en Budapeŝto mi sendas al vi kopion de la laborplano por la periodo 1983-1987.

Mi petas vin atente trastudi ĝin, inkluzive de la enkonduko al la tabelo de prioritatoj, kaj kunordigi ĝin kun la laborplano de via asocio.

Tre verŝajne en la estonto la raporto al la komitato sekvos la skemon de ĉi tiu laborplano kaj UEA regule petos vian asocion pri informoj rilate al la farita laboro sur ĉiu aparta laborkampo.

Tre amikajn salutojn

Renato Corseti  
estranano pri Planado



# Bulgara Esperanto Asocio

## Informilo pri instrua laboro

### Dum Fakkunveno de la Instruistoj

La Fakkunvenon, okazinta la 24an de septembro 1983 en Ŝkofja Loka (Jugoslavio), partoprenis 17 geinstruistoj (1 el Aŭstrio, 5 el Italio, 11 el Jugoslavio) kaj kelkaj observantoj.

La ĝisnunaj spertoj de la Esperanto-instruado, precipe la oficiala trijara eksperimento pruvis, ke Esperanto utilas al plifundiga scio pri la gramatiko de la gepatra lingvo. Poste oni povas konstati pli bonajn rezultojn de la fremdlingva scio dum la deviga lernado. Tio estas jam science pruvita.

Pro tio oni rekomendas komenci instrui Esperanton al la dekjaruloj, kie eblas. Estas aprobitaj la ĝisnunaj preparlaboroj, kiujn faris Instruista Sekcio de Slovenio rilate la instruplanon kaj lernolibrojn por fakultativa instruado de Esperanto en elementaj lernejoj (temas pri la bildlibroj *En Ten Tini*).<sup>1</sup>

Bonan progreson faris la kroata eldonejo Internacia Kultura Servo (IKS), kiu eldonadas simplan lernolibron laŭ science elektita 500-vorta trezoro. Oni preparas jam la 5an eldonon de tiu ĉi plibonigita lernolibro. Laŭ ĝi oni preparas ankaŭ aldonajn legaĵojn. Ĝi taŭgas por kursoj, por eksterlerneja aktiveco, por interesa aktiveco en la pli altaj klasoj de la elementaj lernejoj kaj por mezlernejoj.

La saman lernolibron de IKS intencas adapti aŭstriaĵ kolegoj kaj nomi ĝin "Strukturo de la Internacia Lingvo". Estos interese fari poste skribajn kaj personajn kontaktojn inter la gejunuloj el niaj landoj, kiam la gelernantoj havos la saman vorttrezoron kaj proksimume la samajn lingvokononjn.

El ĉiuj tri landoj ni kolektas kantojn, ludojn, poemojn por infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj. Per tia didaktika materialo ni plivigligos la instruadon kaj la kluban laboron. Raportis: S. Tavčar.

1. En Slovenio ni deziras unue prepari instruistojn, kiuj kapablos instrui nian lingvon. Pasintjare okazis koresponda kurso por instruistoj, en junio – seminario, kie nie pritraktis konkretan instruplanon por Esperanto-instruado en la 3a klaso de la elementa lernejo kiel fakultativa lingvo (du jarojn antaŭ la deviga fremda lingvo). La sama maniero estos daŭrigata en la 4a klaso. Ni akceptis bildlibrojn »*En Ten Tini*... Nun mi preparas la libron en slovena por niaj instancoj kaj poste mi klopodos prepari ĝin ankaŭ en Esperanto ĝis la 18a Konferenco de ILEI.

### Propono

**al la instruistoj de Esperanto uzi la bildlibrojn *En Ten Tini* por instruado al 10-jaruloj en la elementaj lernejoj farita dum la JEL-Kongreso (novembro '83) en Ŝkofja Loka.**

La bildlibroj *En Ten Tini* 1 kaj 2 estas senvortaj bildlibroj, kiuj aperis en 1981 en Rijeka kun aprobo de la klerigaj instancoj de la respublikoj Slovenio kaj Kroatio. Aldona gvidlibro por instruistoj en tri lingvoj (itala, kroata kaj slovena) montras, ke la bildlibroj estas dediĉitaj al la infanoj de la dulingvaj teritorioj, proksimaj al la itala landlimo. La samaj bildoj estas uzataj por la instruado de la dua lingvo (lingvo de la vivmedio) en la lernejoj, kiel oni devige instruas la duan lingvon ekde la unua klaso de la elementa lernejo.

Se tiuj ĉi bildlibroj taŭgas por tri lingvoj, ili povas esti utilaj ankaŭ por la kvara lingvo, por la Internacia Lingvo Esperanto. Ni komencas instrui Esperanton fakultative en la 3a klaso de la elementa lernejo, kie la infano eklernas novajn esprimojn en la nova lingvo ludante, kantante, desegnante kaj tre malmulte skribante.

Ĝenerale bildlibroj estas la plej utilaj en la antaŭlerneja edukado kaj klerigado de la infanoj en ĉiuj landoj por akiri esprimmanieron en la gepatra lingvo. La saman metodon ni uzu instruante la Internacian Lingvon. La samajn bildlibrojn oni uzu pli ofte pli larĝigante la vorttrezoron kaj la esprimmanieron laŭ jenaj ŝtupoj:

1. Nomi la objektojn (substantivojn en singularo kaj pluralo).
2. Aldoni ecojn de la objektoj (adjektivojn en singularo kaj pluralo).
3. Nomi la agadon (verbojn; pli frue lasi "estas" kaj uzi: sidas, staras, iras, kreskas,...).



4. Priskribi la bildojn per tutaj frazoj.  
 5. Klarigi la akuzativon ripetante ĉiam: "Kion ni vidas?" Ni vidas objektojn, diras ties ecojn en singularo kaj pluralo, ni rakontas per tutaj frazoj la agadon.

La bildlibroj *En Ten Tini* ne estas laborlibro aŭ kajero. Ĝi restu pura! Sed la infanoj havu aldonan desegnokajeron, kie ili desegnu, skribu, kolorigu laŭ sia plaĉo kaj scipovo.

La detala instruplano por la instruado enhavu semajnajn unuojn por lernado kaj desegnado, por kantado kaj ludado. Ni aldonu al la bildoj simplajn dialogojn, kiujn la infanoj povas parkerigi. Tiel la bildoj estu vivantaj.

Same ni povus uzi aldone aliajn bild(libr)ojn pri bestoj, kiujn la infanoj jam posedas kaj ŝatas. Al la naciaj vortoj ni aldonu la internaciajn. La infanoj povas alporti ankaŭ ludilojn en la klason. Ju pli agrable, des pli efike!

Do ni instruu per bildoj! Ni instruu desegnante, kantante kaj ludante! Sindone kaj *esperante*! Kaj la infanoj estos ni!aj!

Proponis: Sonja Tavĉar

## SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Aŭstralujo	: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-41 73.
Aŭstrujo	: Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI-Societo de Aŭstria Esperanto-Instruistoj) Rannachstr. 3 A-8046 Graz.
Belgujo	: E. van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal. E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout. M. Sondervorst, Rue du Téléphone 1, B-2180 Mettel. H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes. Elvira Fontes, C. P. 5888, São Paulo.
Brazilo	: Hilary Chapman, 34 Liwin Deganwy Conwy Gwinedd LL3 12RA
Britujo	: Marin Bacev, Postkesto 1054, Sofio.
Bulgarujo	: Lis Thune, Brembärvänet 15, DK-2650 Hvidovre.
Danujo	: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.
Finnujo	: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.
Francujo	: F. R. Germanujo: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.
F. R. Germanujo	: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).
Grekujo	: Andrés Martin Gonzáles, Armengual de la Mota, 33, E-2, 4ºD, Malaga-7
Hispanujo	: Zsuzsa Barcsay, Bem rkp.25/b, H-1011 Budapest
Hungarujo	: M. Saghajian Apt. 7N.34 24 <sup>th</sup> Street, Kuj Nasr Avenue, Teheran 14488
Irano	: Josef Murjan, p.c.k. 1289, IL-61012, Tel Aviv.
Israelo	: Catina Dazzini, C. P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.
Italujo	: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.
Japanujo	: Miodgrad Stojanović, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.
Jugoslavio	: Robert Hoener, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.
Luksemburgo	: Eugene Raveloson, B. P. 1663 - 101, Antananarivo
Malagasujo	: Anthony Mercieca - 20 Valletta Road - Qormi
Malto	: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.
Nederlando	: Arthur Eikenberry, 621 Aurora Ave., Santa Barbara, Ca 93109 USA
Nordameriko	: Vidar Olaussen - Fakerlibakken 1 - 3000 Drammen - Norvegio
Norvegujo	: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.
Nov-Zelando	: Mäg. Barbara Chmielewska, Pedagogia Komisiono de Pola Esperanto-Asocio, Ul-Jasna 6, PL 00-013 Warszawa.
Polujo	: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1ºEsq. Lisboa Marques.
Portugaliao	: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Republica di San Marino.
Sanmarino	: Johannes Palu, Sólme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV, Nikolaj Starodubcev, Poŝtrestante SU-3-340047 Doneck.
Sovetujo	: Axel von Blottnitz, Marcolaan 8, 1700 Florida Glen.
Sud-Afriko	: So Gil Su - Sodemun P. K. 59, Seŭlo 120.
Sudakoreujo	: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.
Svedujo	: Esteban E. Mosonyi, Apartado 51500, Chacao, Caracas.
Venezuelo	

## Izolitaj Membroj

Ĉeĥoslovakujo	: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hrimedzice Okr. Pribram.
Cinujo	: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.
Germana D. R.	: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brüel.
Kubo	: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.
Singapuro	: Hongi Liao, apt. blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.
Zairujo	: Antoine-Samuel Ngangu, B. P. 13, Lukala, Nkandu.



## Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg' 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.  
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Iugoslavio.  
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa. Italujo.  
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Collegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.  
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

## Kunlaborantaj Organizoj

EEC Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).  
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:  
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussell.  
FIMEM Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne - 35 Avenue  
Jottrand 1030 Bruxelles - Belgique. Tel. 02 277 49 36.  
ICEM Esperanto - I, rue Galissonnière - F - 44330 Le Pallet - Francio.  
SAT Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.  
UEA Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.  
UNESKO Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoj, F-75007 Paris.  
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:  
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,  
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (30 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon  
de IPR.

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj  
aerpoŝton)

Kontoj:

1. poŝtgirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de  
Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum  
pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)
2. poŝtgirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —  
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro